Titolo Epizodoj

Aŭtoro Lode Van de Velde

ISBN 978-1-326-51837-0

Poemoj verkitaj inter 1998 kaj 2008.

Por la naiva kulo

Por la naiva kulo,
senkompate frakasita
inter varma, kruela mano
kaj malvarma, dura muro
neniu sentas kompaton.

rendevuo

vi estas hodiaŭ
mi estas morgaŭ
ni renkontiĝos
je noktomezo

sekura mallibero

Kio donas al vi senton de sekureco?
Seruroj ĉe la pordo kaj sur via biciklo?
Policano ĉe la angulo de la strato,
por protekti vin kontraŭ viaj apuduloj?
Aŭ zono kiu ligas vin al via seĝo,
por eventuale malpli vundiĝi?

Kio donas al vi senton de sekureco?
Kondomo kiu malebligas rektan kontakton?
Aŭ eble tampono kiu ne likas?

Preferas mi liberon kaj iom da danĝero,
la cikatrojn mi ja portos:
por ke mi povu vidi ke mi vivis.

vivo

vojkruciĝoj,
trafiklumoj.
ruĝaj lumoj,
verdaj lumoj.
semaforoj,
metaforoj.

neniam

neniam forgesu
ke mi amas vin.
tiam mi neniam forgesos
ami vin.

rigardu

bonvole rigardu min
dum mi rigardas vin.
mi volas ke vi vidu
ke mi vidis vin!

sparko

okulbrilo
korbrulo
ekflamo
... de amo

aŭtobiografio

li vojaĝas kaj serĉas,
serĉas sed ne trovas
li eĉ ne scias
kion li serĉas,
sed li vojaĝas kaj serĉas.

mi pensas ke
li serĉas amon.

fino

en maro senvorta
silentas vi surdige
'Jen la fino.'

muta pro miro
vekrias mia koro
pro la fino.

Rigardu min!
Ne per viaj okuloj,
sed per via spirito.

Bonvenigu min!
Ne per viaj brakoj,
sed per via koro.

Vi pensas ke vi scias
kiu mi estas,
sed vi neniam venis
proksime al mi.

Mi ne estas la kvieta knabo
kiun vi pensas koni.

Ĉu fakte al vi gravas?
Vi opinion jam formis.

Nu, ankaŭ mi.
Nun, forfikiĝu!

tri stumpoj

vi venis ĉi tien,
mi vere ĝuis,
sed nun vi estas for.
restas nur
tri stumpoj en cindrujo,
almozo, trezoro,
memorigaĵo pri vi.
Forĵeti la stumpojn
estas rompi mian koron.
Ili restu ĉi tie

ĝis ...?

Antverpeno

trankvile sonĝas la vilaĝo,
luno lumigas la kampojn,
bovinoj estas stale
enlite oni amoras aŭ dormas.

laŭte ronkas la urbego
lanternoj lumigas la stratojn
ebriuloj balbutas bufede
enlite oni amoras kaj pagas.

nokte mi promenas tra la urbo,
ĝuas la intiman etoson
stelojn mi ĉi tie ja ne vidas,
sed la Skeldaj lumoj kompensas.

homo sapiens

la homo,
ĉiondetruanta kreitaĵo:
eĉ sin mem detruanta per
ĉio ajn: tabako, drogoj,
alkoholo kaj atom-armiloj.

la homaro,
gregoj bezonantaj gvidistojn
kaj gvidistoj bezonantaj gregojn
eĉ la liberemaj hipioj estas klonoj
de siaj longharaj modeloj kaj idoloj

la homara eco,
egoismo kaj sinlaŭdo abunda
kombino de fiero kaj emocioj
erari estas homa,
aŭ ... ĉu eble la homo estas eraro?

spegulo

kiel spegulo en kanaria kaĝo,
miaj poemoj estas mia kompanio.
ili estas la reflekto de mia interno,
en la malvarmo de la ekstera mondo.

tabuo

'seksumo' estas t.n. maldeca vorto
kiun oni ofte preferas eviti.
sed kie ni estus
se niaj prapatroj ĝin evitis?

simiio

se mi kreus la mondon,
ni ankoraŭ estus simioj.
ĉar la tuta homaro
daŭre restas primitiva

drogoj kaj alkoholo,
por sindetruo
armiloj kaj militoj
por ilindetruo

se mi kreus la mondon,
ni ankoraŭ estus simioj.
ĉar la tuta homaro
ne meritas ĝian intelekton.

for I

ĉi trajno
portas min for
de rememoro
pri doloro

mi iras for
al suno
ege for
de vintro

iun tagon,
ĉio fandiĝos,
sed ĝis tiam
mi restos for.

la fando,
estigas larmojn
iam kaj tiam,
mi fandiĝas

for II

mi iris for
do nun mi liberas
ĉi tie mi restas
estante simple mi

ne vidi retren
ne bedaŭri,
forgesi la nigron
la morton

simple plui
vivo mallongas
la pasinto pasis
ludi novan kordon

novan kanton
sur tabulo vaka
mi ne scias kiom longe
la klara ĉielo

sed nokto
ĉiam revenas
la obskuro
daŭre turmentas.

hajko

perfekta korpo
modlas ĝiajn konturojn
en sia robo

aŭ ĉu estas tro malfrue?
kiel daŭrigi
kion vi faras
kiel vi fartas
kaj skribu al mi
prenu ĝin,
tie en via ŝranko
mia foto

foto

nokta promeno

nokto
stelo
promeno
mano
mano

kiso
ardo
deziro
lango
buŝo

mano
mamo
stelo
luno
pubo

parko
lango
herbo
pubo
stelo

likvo
lango
mamo
pubo
pubo

ene
suno
stelo
kuno
unuo

lukto

kiu estas venkanta?
nun sube, poste supre,
strategia retiro
poste surprizatako

ekvilibra tekniko
kaj nova taktiko
oleo sur arda fajro
turbojeto sen stirilo

nun ambaŭ partioj falis,
ĉiuj fortoj elĉerpiĝis
estis la lasta rondo,
nun lekado de vundoj.

vertikala gracio,
horizontala pasio,
tuta kapitulaco
post kopulacio

momento

Mi trovis la foton, hazarde.
ne,
    ne estas foto,
estas momento,
parto el mia vivo.

promenoj en la urbo,
trinkaĵoj ie kaj tie
paroloj ĉe muziko,
batado de la koro.

Kien iris la tempo?
Ĉu kaptita en ĉi-papero?
ne,
     vigla en mia cerbo
nemortebla memoro.

ankaŭ vi estis tie.
ĉu vi rememoras?

malpleno

mi enrigardis loĝoĉambron
ŝajnis esti sufiĉe intima
la familio spektis televidon.

mi vidis la gepatrojn, la infanojn,
sidantajn sur apartaj kanapoj,
la salontablon en la mezo,
kafon kaj teon, iom da biskvitoj.

pasive oni spektis la agadojn
al kiuj ili evidente sopiris.
post la filmo oni enlitiĝis,
kontentaj kaj malstreĉaj.

la salono daŭre estas malplena
kiel dum la antaŭa momento,
kaj kiel en pasinto, ĉe mi.

foje

foje
mi amas vin
foje
mi ne amas min mem

foje
mi forgesas vin
foje
mi pensas pri mi mem

foje
mi volas forgesi vin
foje
mi forgesas min mem

foje
vi vivas en mi
foje
mi vivas en vi
foje

ree

li ploras kiel bebo ploras,
apud la lulilo sidas liaj gepatroj

li rampas kaj falas iam kaj tiam
li jam povas descendi la ŝtuparon

li refoje ne rajtas eliri la hejmon,
do li forkuras, for de la vilaĝo

la mondo
daŭris longe

post jaroj li retrovas la vilaĝon
eĉ la domo restis - nun malplena

malrapide li supreniras la ŝtuparon
same pene kiel tiom longe antaŭe

la ĉambro aspektas tute sama
ankaŭ la lulilo daŭre estas tie

ili konservis ĝin la tutan tempon
kaj li ploras kiel bebo ploras.

el trinkejo

mi sentas min tiom vertiĝanta - pli bone estus
se mi ne trinkis tiom profunde el la botelo

jam tro malfrue
ĉambro turniĝas
aŭ ĉu estas mi?
mi kaptas
iun seĝon
ĝi falas
kaj mi sur ĝin
ni kuŝas tie
ambaŭ kvazaŭ mortaj

la seĝo estas rektigita
kaj mi eksteren ĵetita.

triumfo

ĉi tie vi estas
tie li staras
vi iĝas ruĝa
li pli ruĝa

li rigardas min
vi rigardas teren
mi rigardas vin
tiam, vi foriras kun mi.

mi scias

vi ŝatas la membranon
sur la varma lakto
mi daŭre volas doni ĝin al vi -
jarojn poste

lukto II

miaj oreloj fajfas
pro la galopado
de la sango
tra miaj vejnoj

mi sangas
- doloras -
sed mi ankoraŭ
nenion sentas

mi denove donas baton
denove ricevas frapon

mi f
a
l
a
s

l t
a a
li s s sur
min

ni ekrulas rond-kaj-rond
kaj rond kaj rond
rond kaj rond
kaj rond

HALTU!

nun venas instruistoj
kolere ili disigas nin
kaj kiel saĝa puno
ni ricevas pliajn batojn...

makuloj

jen sur la tapiŝo
falis la fazeolosupo

rigardu la tapeton
la kandelo tro forte elblovita

ĉi tie sur la pordo:
la hundo bezonis promenado

malbelaj cikatroj ĉambre
bele konservitaj memore

hejme

ŝi atendas
mian revenon
lojale kiel hundo

ŝi brakumas min
dum mi envenas,
tenere kiel amanto

ŝi konas min
nudan aŭ vestitan
kiel neniu alia

ŝi varmigas min
sidigas min komforte
en sian seĝon

ŝi moligas miajn
suferojn kaj dolorojn
kiel plej bona amiko

ŝi aŭskultas miajn
larmojn kaj ĝojojn
sen antaŭjuĝoj
mi estas hejme
en mia ĉambro,
mia kompanio.

vi rajtas

ŝajnvere
vi staras tie.
kion
vi serĉas?
pri kio
vi pensadas?
aŭ
ĉu vi larmon kaŝas?

venu al mi
parolu se vi volas
aŭ forsilentu ĉion
vi rajtas

stumblo

blindigita pro la lumo
de feliĉo
li stumblas pro io simpla,
kiel vorto.

malalte

vi asertas ke vi
staras apud mi
kial do mi ne vidas vin
kiam mi flankenrigardas?

vi pensas ke vi
staras super mi
kial do mi ne vidas vin
kiam mi suprenrigardas?

mi pensas ke vi
staras sub mi
sed kial mi ne vidas vin
kiam mi subenrigardas?

ĉu vi estas tiom malalte?

reflektoj

rigardu suben
al la lago
vidu la reflekton
de la stela lumo.

rigardu supren
al la luno
vidu la reflekton
de la suna lumo.

rigardu antaŭen
al la spegulo
vidu la reflekton
de mia lumo

piedspuroj

ni promenas renkonten
mi vidas vin proksimiĝi
la okulojn deteni mi ne povas
mi volas alparoli vin, sed kiel?

ni estas tuj apudaj
mi flaras vian florperfumon
kaj provas diskrete, ŝtele
plurigardi vin.

ni preterpasis unu la alian
mi mallonge retrenrigardas
kaj nur vidas vin pluiri netuŝite?
sed viaj spuroj restos en mia memoro.

reve

senkonscie
vi ĉiun momenton de la tago
ŝtel-eniras miajn pensojn,
kviete kaj nerimarkite
kiel kaŝa pafonto
kaj subite vi lanĉas
sagon el arko
rekte en mian koron
vi trafis min
mi falas,
mi falas
pro viaj ĉarmoj
ĝiam, vi ĉirkaŭbrakas min,
kaj levas min alten super la mondon

signo

kiam vi rigardas min
mi volas ĉion konfesi
sed mi ankoraŭ ne rajtas

mi devas pacienci
cela pensado estas danĝera
tial mi pluatendas
signon de vi

kaj kviete mi esperas
ke ne ankaŭ vi
atendas signon...

cico

mi vidis vian dekstran cicon,
pure pro hazardo
dum ni estis sidantaj
sur ĉemara teraso

mi sidis flanke de vi
kaj spektis akcidente
en la sekretan spacon
malkaŝita de loza butono

kaj tie ĝi estis:
sub via blanka bluso,
la dura, bruna delikataĵo,
nur pinto de glacimonto

renkonto

jen en malproksimo
flustras la bela knabino
dolĉe en mian orelon:
'vi ja ne sukcesos
kapti min!'

mi postiras ŝin
dum mia ombro
timeme sin kaŝas
en flankstrato

de certa distanco
li rigardas nin kaj pensas,
dum mi brakumas ŝin:
'tio ne eblas'
kaj ridante ni foriras.

La pejzaĝo de mia vivo (i)

mi ne amas silenton
jam okazis tro da ŝtormoj
tro da arbaroj elradikigitaj
en la pejzaĝo de mia vivo.

mi volas planti novajn arbojn,
kultivi la teron tre ĝisfunde
por krei belan paradizon
el la pejzaĝo de mia vivo

La pejzaĝo de mia vivo (ii)

multaj restadis en la pejzaĝo de mia vivo
unuj lasis pli profundajn spurojn ol aliaj
kelkaj ankoraŭ rondvojaĝas
mi esperas ke ili trovas sian vojon.

multaj kunlaboris pri la pejzaĝo de mia vivo
unuj plantis pli belajn florojn ol aliaj
kelkaj ĉion kreskantan detruis
sed tiel kreis spacon por nova vivo

multaj estas bonvenaj en mia pejzaĝo
unu vidas pli belajn lokojn ol la alia
aliflanke kelkaj perdiĝas en mallumo
mi esperas ke iam iliaj okuloj malfermiĝos

la vivo estas kiel pejzaĝo
kiun ni - sola aŭ ne - rajtas prilabori
kaj nur kiam ĉio komencos flori
tiam mi estos profunde feliĉa.

vi estas tiom bela
mi ne povas tuŝi vin
vi estas tiom frela
mi ne volas rompi vin

se mi tuŝos vin
eble vi ridetos
sed se mi rompos vin
certe mi suferos

vi estas tiom bela
mi ne volas krevigi vin
vi estas tiom frela
mi povas nur reteni min

adiaŭ

sino

la unuan fojon
mi banis en via sino...
sed kio estas monatoj?
la lastan fojon
estis nur dronsablo.

senkliŝe
mi volas pripoemi vin
ĉar vi meritas pli

sed vortoj min malhelpas
ĉiuj jam brokantaj
novaj ne kompreneblaj

tamen mi volas
pripoemi vin,
eĉ pli bone ol jene:

en ĉi teran formikejon
vi naskiĝis nekonscie
kaj amigas sammaniere,

tio estas: nekonscie
spontane kaj volonte
senpere... sed ankaŭ sendanke

sed mi ne povas

Dis

Kun batanta koro,
longe atendinte, finfine
ekstaris mia korpo.

Venis la tempo,
la sopirata momento,
rendevuo kun ŝi.

Supervigle senripozo
jam dekomence ĉe ŝi
estas mia mortanta spirito.

Nun mia korpo iras
renkonti ŝin kaj eble ankaŭ
retrovi mian spiriton?

Lahti, Finnlando

blanka, ĉio blanka
minus dudek
blankaj montetoj
blankaj vojo kaj arboj

brila suno
blindiga neĝo
mil speguloj
kaj sunokulvitroj

kune for, kune reen,
manĝo preta, por vi
kaj vi,
ĉiam preta por mi.

Shikoku, Japanio

strando ĉemonta,
maro kaj ĉielo bluaj
hundeto el rivero
kaj du inbicikloj

multaj vilaĝetoj,
temploj kaj temploj
aliaj kaj samaj,
ĉiam io nova.

ŝvitaj vestoj,
freŝa duŝo,
ruĝa krepusko
fremdaj steloj ĉiele.

pluvo

la kvietaj gutoj rulfalas
plenigas la nubon,
la pumpantan nubon,
nutratan de doloro -
ili plenigas la nubon
per vakuo
kaj poste
restas nenio

poste estas nenio

.

ŝnuro

vi kaj mi,
ŝnuro kun du
ekstremaĵoj.
vi kaj mi,
bedaŭrinde,
ŝnuro
kun du finoj,
ŝnuro
sen komenco

(sentitole sed ne senpetole)

en poemo
ne la formo
estu normo

pli gravas la enhavo
kiu brave kiel pavo
estigu senton de ravo.

rimo, jambo, anapesto
kaj la mekanika resto
estas bone por intelektulo,
sed ne por romantika animo.

forgesu la formo-normon
konsultu, aŭskultu la koron
ne bridu la animon,
liberigu la muzon

kuru, kantu
sidu, sonĝu
vivu vere,
libere senregule

vivu laŭ-eme,
eme kaj ame
poeme kaj
po-eme.

lotte joris (1980-2005)

la vivo por vi tro rapide fluis
kaj ĉie ĉiam vi malfruis;
sed ĉiuj kiuj vin konis
volonte vin pardonis.

hodiaŭ,
trista mesaĝo atingis min:
je la aĝo de nur dudek kvin
el la mondo vi forpasis vakue;
multe, multe, multe tro frue.

folioj ĉe arbo

folioj ĉe arbo abundas
kiel homoj en la urbo
ili susuras, murmuras,
sed ne konas la alian.

ili naskiĝas kaj mortas
printempe kaj aŭtune,
nur la fluon de sezonoj,
la homo (ankoraŭ) ne majstras.

folioj spiras, homoj spiras
oksigeno pingponge alternas
de la verdaj pulmoj
al la fume grizaj.

arboj en urba parko
kiel indiĝenoj en rezervejo
provas dece vivi,
sed futuron ne havas.

en varma suna tago,
arbo regalas per ombro
la homon sur teraso
sed folio falas en lia glaso

... la lasta venĝo ĝia:
urboj arbojn voras
vivciklojn amase distretas
per betonaj piedoj

... kiuj lasas spurojn ĉie
pri kiuj la homo fieras eĉ
dum la folioj ĉe la arbo
susuras lastan preĝon.

Homoj estas homoj
en la urba parko.
Ne gravas la nomoj
aŭ vestoj kun marko.

Ludas la infanoj
kaj kisas amparoj
memoras geavoj
pri pasintaj jaroj.

Sed nokto alvenas
publiko sinistras
foje vivon prenas
monavido estras.

Homoj estas bestoj
en la parko nokte
ne gravas la vestoj
krimpolico-fote.

En frua mateno
la parko kvietas
ĝis ĉies reveno
kaj
... ĉio sin ripetas.